1 DIFERENCEMAJ PARTIKULARISMOJ KAJ UNIVERSALISTAJ PARTIKULARISMOJ[1]

Diferencemaj partikularismoj kaj universalistaj partikularismoj

La *universalaĵo* ligno prezentas multajn partikularaĵojn: ĝi povas ekzisti per diversaj formoj, specoj, multoblaj variaĵoj: kverko, fago, betulo, arbaro, trabaro … La *universalaĵon* akvon oni ankaŭ povas observi tra diversaj partikularaĵoj, aperantaj performe likvida, sed ankoraŭ solida, glacia (simpla glacero, glacejo, glacimonto), gasa (vaporo, nubo)... la universalaĵon karbonon per apartaj formoj de diamanto, de grafito aŭ alia minkarbo, ktp… Ĝenerale, la partikularaĵo estas unu el la formoj, per kiu povas prezentiĝi iu ajn kategorio, universalaĵo.

En la ĉapitroj de sia *Granda Logiko* (*Wissenschaft der Logik*, 1816) dediĉataj al tio, kion li nomas "la koncepto", Hegel rilatigas dialektike tri diferencajn nociojn, kiujn oni povas klasi ĉe tiom da gradoj:

- 1/ la ***universalaĵo*** (notita "U"), ĉepinte: ekzemple la ligno, la akvo aŭ la homaro;

- 2/ la ***singularaĵo*** (notita "S"), ĉebaze: ekzemple, rilate la lignon, tiu stranga pomarbo, kiu kreskas en mia ĝardeno de tridek jaroj; rilate la akvon, tiu molekulo H_2O enplektita inter miliardoj da aliaj, kiu troviĝas en tiu bizara glacero fandiĝanta en mia viskio; rilate la homaron, tiu homo, konsiderata inter miliardoj da ties samspeculoj: li havas kiel nomon (strangan al nia aŭdado) *Tamati Ranaipiri*...

- 3/ Finfine, mezgrade, la ***partikularaĵo*** (notita "P"), intere de tiuj antaŭaj nocioj: kiel partikularaĵo de la ligno oni povas citi la specion de ĉiuj pomarboj, aŭ horto de persikarboj, plantejo de heveoj (*la ligno kiu ploras*), tia arbaro, iu trabaro; kiel partikularaĵo de akvo, ni mencios la aron de la tutteraj glacimontoj, la riveregoj de Centra Azio, la aro de la alfluoj de la Amazono, ktp...

Ja pli ol la ligno aŭ la akvo, la homaro prezentas partikularaĵojn, tion ni tuj konstatos pri la t.n. Tamati Ranaipiri: la etnon (tiu homo estas Maorio), la sekson (li estas masklo), la tribon (li venas de la Ngati-Raŭkava tribo), la kategorion de aĝo (li estas plejaĝulo), la biologian staton (vivanto, mortinto aŭ inter ambaŭ), la familio, ktp. Tiuj supremenciitaj ekzemploj montras ke *universalaĵo*, *singularaĵo* kaj *partikularaĵo*, (notitaj *USP*) ne estas simplaj abstraktecoj rilate al iu teoria "koncepto", sed ankoraŭ, remetante Hegel surpiede (por reuzi la faman formulon de Marx[2]), konkretaj realajhoj observeblaj en la diversaj Regnoj de la naturo, vegetala, animala aŭ minerala.

.... Kaj per maniero ja pli interesa ĉe la homaj kaj sociaj aferoj. Ĉiu homo, ekzemple, singulara elemento (*S*), *atomeca* individuo, rilatas al la universalaĵo "homaro" (*U*), nur pere de multoblaj partikularaĵoj (*P*), tiom da molekulaj kombinaĵoj, kiuj ĝin karakterizas. Limigante min al la tradicia, antaŭkapitalisma homaro, mi ĉi-supre citis la etnon, la familion, la tribon, la

1 Tiu ĉi neeldonita teksto devas esti enigita anekse de verko pli ĝenerala, nun prilaborata, kaj kie la temoj pritraktitaj en tiu tekstaro estas pliprofundigitaj kaj disvolvitaj.

2 "Laŭ Hegel, la movado de la penso, kiun li enpersonigas per la nomo *Ideo*, estas la demiurgo (ndt.: la konstruanto) de la realajho, kiu estas nur la fenomena formo de la Ideo. Laŭ mi, male, la movado de la penso estas nur la reflekto de la reala movado, transportita kaj transmetita en la homan cerbon. Mi kritikis la mistikan flankon de la Hegela dialektiko antaŭ proksimume tridek jaroj, je momento kiam ĝi estis ankoraŭ laŭmoda (...) Sed kvankam, sekve de sia miskompreno, Hegel kripligas per la mistikismo la dialektikon, li estas tamen la unua, kiu raportis pri ties tuta movado. Ĉe li, ĝi marŝas surkape; sufiĉas remeti ĝin surpiede por al ĝi trovi tute racian fizionomion (Marx, Postparolo al la dua germalingva eldono de *La Kapitalo*, 1873).

sekson, la aĝkategorio, la biologia stato... Oni ankoraŭ povus mencii la socia situacio: klaso, ordeno aŭ kasto laŭkaze, tiom da partikularaĵoj kiuj, ekde nia naskiĝo, progresive determinas chiun el ni, *partikularigante* nin poiome.

... Sekve de la fama aserto de Simone de Beauvoir, laŭ kiu "oni ne naskiĝas virino, tia oni fariĝas" (kun ĉiuj kondiĉadoj, kiujn tiu homa partikularaĵo kunportas), oni povas aserti, ke oni ne naskiĝas franca aŭ japana, araba aŭ cigana, kristana aŭ juda, parizano aŭ novjorkano... Oni ne elektas la multoblajn partikularaĵojn, kiuj karekterizas nin: niajn parencojn, nian familion, niajn lernejajn aŭ destratajn gekamaradojn, tiu kolekto da individuoj, kiuj influas nian vivon pli malpli forte, kaj kontraŭ kiuj ni finfine reagas niavice. Ni ankoraŭ notu, ke ekzistas homaj partikularaĵoj de kiuj oni facile povas eliri (la infanaĝo, tia aŭ alia asocio, religio, eĉ nacieco), kaj aliaj de kiuj tio estas pli malfacila (la sekso, la etno).

Ni ekzamenu, cetere, la problemon de la *partikularismoj*.

Kelkaj homaj partikularaĵoj (ekz. la tribo) naskis iajn partikularismojn al si asociitajn (la tribismon); foje, sed malpli ofte, iu partikularismo (la kristanismo) sekvigis partikularaĵon (la Kristanaron). Rapida ekvido al la paro Kristanaro-kristanismo elmontras tiun fakton: la partikularaĵo prezentas karakteron pli neŭtran, malpli viglan, ol la partikularismo, kiu de ĝi sekvas: Kristanaro, komunumo, Islamo, korporacio, nacio, Okcidento aperas kiel realaĵoj pli mildaj, iamaniere, ol siaj asociitaj partikularismoj (kristanismo, komunumismo, islamismo, korporaciismo, naciismo, okcidentocentrismo...). La nomo "islamano", ekzemple (rilate al tiuj, kiuj apartenas al la islama komunumo, la t.n. *Umma*) estas pli neŭtra ol la devenita termino *islamisto*. Reciproke, aldonita al iu ajn partikularaĵo (ekz. la femineco), la sufikso *ismo* donas al ĝi akcenton pli fortan (la feminismo)[3].

Tiel, post kiam ni estis *partikularigitaj* pli malpli objektive – vole nevole – eĉ baptitaj por iuj el ni, ni ankaŭ povas "*singulariĝi*" subjektive adoptante tian aŭ alian partikularismon (je la plej ampleksa senco); tiel, oni povas fariĝi egoisto aŭ sindonisto, nudisto aŭ hedonisto, naciisto aŭ federaciisto, esperantisto, universalisto, kubisma aŭ nov-impresionisma pentristo, ekzistadisma aŭ "postmodernisma" filozofo, fascisto, komunisto, socialisto aŭ anarkiisto de tia aŭ alia tendenco[4]. Tiam, oni fariĝas Napoleono Bonaparto, Adolf Hitler, Lenin, Bin Laden, Tamati Ranaipiri, Djémil Kessous, Ulrich[5], etc., etc.

Do, ekzistas notinda diferenco inter partikularaĵoj kaj partikularismoj, tion instruas al ni la

3 La sufikso *ismo*, tamen, ne aplikiĝas ekskluzive al homaj partikularaĵoj, funkciantaj laŭ tio, kion oni nomas hodiaŭ la *identeca fenomeno*, sed pli ĝenerale, al multaj aliaj "partikularaĵoj": politikaj ideologioj (la anarkismo), artismaj skoloj (kubismo), dirmanieroj propraj al iuj lingvoj (idiotismo), antropologiaj kondutoj (kanibalismo) ech biologiaj sistemoj (parazitismo, ktp.). Krome, iuj partikularismoj atingas tian ĝeneralan dimension, ke ili povas esti sistemigitaj, formaligitaj kiel difinitaj sociaj sistemoj: la komunumismo, tipa al la tradiciaj socioj (per diversaj formoj: tribismo, klanismo, ktp) aŭ la naciismo, fundamente tipa (kun la kapitalismo) al la Modernepoko.

4 "Laŭ unu vidpunkto oni povas aserti, ke estas en la socialismo tiom da tendencoj kiom da individuoj", skribas Jean Jaurès (la 29an de aprilo 1891 en *La Dépêche de Toulouse*). Sed ĉu tiu vero ne aplikiĝas al ĉiu politika movado?

5 *Ulrich* estas la heroo (paradoksa) de la fama romano de Robert Musil *Der Mann ohne Eigenschaften* ("La homo sen kvalitoj", 1930-1932, verko ne finita). Musil, fakte, adoptas filozofion kontraŭromantikan: lia ĉefrolulo, Ulrich, estas mezgrada homo, statistika, interŝanĝebla. Ĉar tiu romano estas ege longa, oni povas konsulti la analizon, kiun faris Jacques Bouveresse: *la Homo probabla* (1993, en la franca). Tiu frazo, eltirata de la kvara paĝo de kovrilo (iomete konfuza, tamen) donas al ni ideon pri la problemaro de l' romano: "Tial ke la homa historio ne estas, laŭ Musil, tiu de la genio sed de la *mezgrada homo*, la demando metita al la verkisto estas scii kiel li povas sin komprenigi de la mezgraduloj kaj transformi tiun ŝajnan fatalon prezentitan de la neevitebla reveno de la sistemo, kiun li strebas transformi al meza stato kaj la certigitan restarigon de la mezgradula regno al aŭtenta bonŝanco por la homaro". Do, temas tie pri kontraŭ-elitismo, "kontraŭ-aristokratiismo" nepre kontraŭa al iaj filozofioj antikvaj (ekz. tiu de Platono) aŭ modernaj (tiu de Nietzsche).

tuta historio. Tiel, en Eŭropo fine de l' Mezepoko, oni povas observi la progresivan retroiron de la urbaj ***partikularaĵoj***, kiuj okazas samtempe kun la starigo de la naci-ŝtato (kun reĝoj kiel Ludoviko la XIa en Francio aŭ Henriko la VIIa en Anglio). Ĉu oni povas elvoki pri tiu sama periodo, *urbajn partikularismojn*, kiel asertas iuj historiistoj fakaj pri la mezepoka Okcidento? Tiu termino aperas iom forta uzata tiuteme: "urba partikularismo", alidirite "urbismo", kuntrenus ian sisteman kulton de la urbo, de la civito, novan ideologion, kiu disvastiĝus kiel modo. Tia ideologio ŝajnas ne esti intervenita (almenaŭ ne larĝskale), male al tio, kio okazos poste kun la nacio.

Iujn notindajn partikularaĵojn ni povas observi pri la okcidenta Eŭropo. Tiu eta ekstremo de l' mondo aperas al ni kiel kompleksa arkipelago, *makro-duoninsulo*, ariĝo de insuloj kaj duoninsuloj, kun la maro ĉie ĉeestanta, favoranta la komunikadojn. Male, la multaj eŭropaj montaroj favoras la izoliĝojn, la enklaviĝojn, tiujn naciajn partikularaĵojn, de kiuj David Cosandey trovis genran terminon per la esprimo *firma politika apartaĵo* (verko en la franca: *La Sekreto de Okcidento*, Arléa, 1997). Oni povas tie konstati kiel la partikularaĵo antaŭekzistas al sia asociita partikularismo, ĉar la naciismo, eŭropa ideologio origine estigita de la ĉi-supraj materiaj partikularaĵoj, devos ankoraŭ iom atendi antaŭ ol aperi kaj generaliĝi al la tuta planedo[6].

*

Nun, ni observu kelkajn notindajn partikularismojn (kaj aliajn "ismajn" sistemojn); tiuj ĉi povas aperi diversmaniere.

La rasismo, kiel ĉiaj ksenofobioj al kiuj tiu partikularismo asociiĝas, estas ofte la kontesto, la senvalorigo de iuj partikularaĵoj, antaŭ ol esti, implice aŭ ne, la plivalorigo de sia propra (Vd. Spinoza: *determinatio est negatio*). Tiu fenomeno, tre malnova, prezentas du distingajn aspektojn, objektivajn kaj subjektivajn. ***Objektive***, ĝi venas de ĝenerala malsciio, de pranocioj, kiujn hodiaŭ disfaligis la moderna scienco, notinde la genetiko. ***Subjektive***, ĝi neneable prezentas fundamentan instrumentan aspekton, ofte permesante pravigi iujn defaktajn hegemoniajn statojn.

Tio ĉi dirite, ekzistas multaj partikularismoj diferencemaj kiuj, finfine, atingas al la firmiĝo de iu homa partikularaĵo: ne nur la rasismo, sed ankaŭ la tribismo, la naciismo, la virismo (aŭ masklismo) por la maskla specio, eĉ doktrinoj kiel la socibiologismo. La diferencemoj ekzistas de la pratempoj. Tiuteme, la etnologo Levi-Strauss mencias « iujn primitivulojn, kiuj rezervas al si mem la nomon *homo* kaj ĝin rifuzas al la aliaj » (*Race et histoire*, UNESCO, 1952).

Lokante la homon ĉe l' centro de la universo, la humanismo povas esti difinita kiel antropocentrismo. Tiu filozofio ne estas freŝdata. En 1486, Pico de la Mirandolo skribas: mi legis en la tekstoj de la Araboj (...), ke oni povas observi nenion pli admirinda ol la homon" (tiu citaĵo venas de verko, kies titolo, *De dignitate hominis*, tintas kiel manifesto).

Diversaj partikularismoj (tiuj ideologioj, kies la morton oni proklamis) ne estas nepre diferencemaj: male al la maskla virismo, la feminismo kiu celas la egalecon de la seksoj estus prefere, iele, kontraŭ-diferencema; la komunismo, male al la komunumismo, estas universalisma. Ĝi ne estas tutsola tiukaze: diversaj movadoj religiaj (la religioj kristana, islama, budhisma, eĉ la panteismoj) aŭ politikaj (la ekologiismo, la anarkiismo) prezentas pli malpli tian universalisman karakteron.

6 De la naciismo al la imperiismo estas nur paŝeto. Tiel, oni povas kompreni, kaj kiel facile, tiu ĉemara Eŭropo - de la Hispanio de Karolo la Kvina ĝis la Italio de Mussoloni, pasante tra Francio, Anglio, Nederlando… la Belgio de Leopoldo (iomete malpli pri Germanio) - konkeris la tutan planedon.

Iuj formoj de federaciismo prezentas sin kiel regionismon: ili tiel transpasas la nuran internaciismon, kiu ne kontestas la naci-ŝtaton. Tiel, ekde la 1960aj jaroj, la svisa federaciisto Denis de Rougemont disvolvas siajn tezojn esence regionismajn[7]. Pli freŝdate, la usonano Murray Bookchin sin manifestas kiel partizano de la *libereca municipismo*[8]. Ĉu eblas, post kiam la nacio naskis la grandan tutmondan ondon de la naciismoj, ke la regiono eĉ la urbo okazigas similan fenomenon? Jen, post la granda naciisma furoro, novaj partikularismoj kiuj, atingante planedan skalon, povus alpreni ĝeneralan sisteman formon. Tie, ni ne estas malproksimaj al la revoj de Prudhono kaj de ĉiuj utopiaj socialistoj.

Universalistaj partikularismoj? Ni jam observis ĉi-supre ke tiu kontraŭeco povas solviĝi kun iuj el ili, la humanismo ekzemple, kiu prezentas iujn universalismajn tendencojn. Sed la pli freŝdata ekologiisma movado kiu relativigas la lokon de la homo en la naturo, transpasante la malnovan antropocentrismon, aperas tiel notinde pli universalismaj. Necesas tiuteme mencii formon de partikularismo, kiu naskis grandajn esperojn dum la Modernepoko: temas pri la ***laboristarismo***.

Tiu ampleksa movado, dum la du antaŭaj jarcentoj, alprenis diversajn aspektojn, reformismajn aŭ revoluciajn. Tuj kiam la industria revolucio komencas naski ampleksan laboristan klason, montriĝas laŭ iuj progresemuloj, ke tiu ĉi povas ludi fundamentan rolon: la plej juna el la sociklasoj fariĝanta servutigita estas alvokita, per sia lukto kontraŭ la superaj klasoj, rompi siajn katenojn kaj enskribi finan punkton, historian, al la ekspluatado de l' homo per la homo, tiel realigante per la senklasa socio la emancipadon de la homa specio.

"Granda parto de la angla kaj franca proletaro jam konscias pri sia historia tasko kaj senĉese laboras por plialtigi tiun konscion al la plena klarvideco", tiel observas juna 27 jaraĝa intelektulo. Ni estas en la komenco de la 19a jarcento kaj li nomiĝas Karl Marx (La Sankta Familio, 1845). "La emancipado de la laboristoj estu la ellaboro de la laboristoj mem", proklamas, du jardekojn pli malfrue, la Internacia Asocio de la Laboristoj (statuto de 1864 precize verkita de Marx en Londono).

Tamen, nova fenomeno ekaperis en tiu regiono mem, jam kelkajn jarojn antaŭ ol la ĉi-supra proklamo. En 1858, Engels antaŭsentas la mildiĝon de la klasbatalo en Anglio kaj ties reformisma evoluo. Jam tiutempe li tion eksplikas per "la fakto ke la angla proletaro burĝiĝas

---

7 Fakte, la termino *inter-regionismo* estus pli taŭga, ĉar la konceptado de Denis de Rougemont parenciĝas, kvankam ĝi estas notinde pli ellaborita, al la malnova internaciismo, kiun oni trovas, inter aliaj, ĉe Jean Jaurès (Ĵan Ĵores). Jaurès, koncerne lin, estas samtempe internaciisto kaj naciisto (modera). Aŭgusto 1914 signos la fiaskon de tiu ideologio larĝe disvastigita en la socialisma movado, ĉar la inter-naciismo, kiu ajn estas sia formo (soci-demokrata, komunisma aŭ pacisma) neniel proponis konkretan alternativon al la naci-ŝtatismo superreganta. Denis de Rougemont aniĝas, kun Alexandre Marc kaj Emmanuel Mounier, al la personisma movado. Tra la verkaro de tiu aŭtoro, disĉiplo de Prudhono, la regionismo aperas kiel sistemo ege prudente strukturata. Vd. (en la franca) la studon de François Saint-Ouen: *Le concept des régions chez Denis de Rougemont* (http://www.fondationderougemont.org). La regionismo tia, kia Denis de Rougemont ĝin predikas, samkiel la libereca municipismo de Bookchin, eniĝas en la saman movadon kiel la komunismo, je la etimologia senco de tiu termino, kiun oni ankoraŭ povus kvalifiki *vilaĝismo*.
En fait, le terme *inter-régionaliste* serait plus approprié, les conceptions de Denis de Rougemont s'apparentant, mais de manière bien plus élaborée, au vieil internationalisme que l'on retrouve, entre autres, chez Jean Jaurès. Jaurès, en ce qui le concerne, est en même temps inter-nationaliste et nationaliste (modéré). Août 1914 signera la défaite de cette idéologie largement répandue dans le mouvement socialiste, l'inter-nationalisme, quelle que soit sa forme (social-démocrate, communiste ou pacifiste) n'ayant jamais proposé d'alternative à l'Etat-nationalisme, idéologie dominante.

8 *Theses on Libertarian Municipalism*, tezoj aperitaj en la revuo "Our Generation", vol. 16, n° 3-4 (printempo-somero 1985), franca tradukado.: *Du municipalisme libertaire: le désintérêt de l'éthique*, (Vert Montréal-Ecology 1989).

pli kaj pli kaj do ke tiu nacio, la plej burĝa ol ĉiuj, ŝajne volas finfariĝi posedante burĝan aristokration kaj burĝan proletaron flanke de la burĝa klaso. Evidentiĝas ke tio estas sufiĉe normala koncerne nacion, kiu ekspluatas la tutan mondon" (letero sendita al Marx la 7an de oktobro 1858).

Malgraŭ tiu unua senreviĝo, la laborista movado ne ĉesos estigi multajn esperojn ĝisnune: en 1871, ekzemple, kiam la Pariza Komunumo elmontras la ruĝan flagon, insignon de la universala socia Respubliko; poste en 1905, kiam la rusaj laboristoj inventas la ĝeneralan strikon kaj la sovetojn (konsiliantarojn); en 1917, finfine, kiam la samaj laboristoj kaptas, certe nur portempe, la politikan potencon en la sama lando. Ĝisnune, la atenton, la esperon de ĉiuj progresemuloj kaptos ĉia striko iom radikala, ĝenerala: ĉi tie en la aŭtomobila industrio, tie for en la minejoj.

Tamen, ekde aŭgusto 1914, la furioziĝo de la naciismaj pasioj, poste, en 1918, la fiasko de la rusa revolucio – estiel *universalismema* revolucio – elmontras ke la granda plimulto de la internacia laboristaro ne estas vere preta plenumi la mision, kiun la revoluciuloj asignis al ĝi. En Germanio notinde, kiam ekde januaro 1919, la spartakistoj, Rosa Luxemburg kaj Karl Liebknecht unuarange, estas murdigitaj kun la konsento de la soci-demokrataj estroj[9]. Apenaŭ du jarojn post la kapto de la potenco far la bolŝevistoj evidentiĝas ke la de ili dezirita granda ĉenreago de la proletaj revolucioj ne okazos. Okcidento restadas kvieta...

Ekde tiam, pli kaj pli multnombraj revoluciuloj direktos siajn okulojn al Oriento kaj vetos ke la subpremaj nacioj partoprenos en tiu granda historia movado, kiu celas la homan emancipiĝon. Oni sensas tre klare tiun evoluon legante tiujn sinsekvajn asertojn de Lenin:

- La 29an de septembro 1917, iomete antaŭ la rusa revolucio: "La dubo neeblas, ni ĉeestas la komencon de la tutmonda proleta revolucio" (poste publikigita en la artikolo *La Krizo estas matura*, *Raboĉi Put*, n° 30).

- Le 22an de novembro 1919, du jarojn poste: "La socialisma revolucio ne estos nure, nek ĉefe, la lukto de la ĉiulanda revolucia proletaro kontraŭ ties burĝaro; ne, ***ĝi estos la lukto de ĉiuj kolonioj kaj de ĉiuj landoj subpremitaj de la imperiismo kontraŭ la internacia imperiismo.***" (en parolado ĉe la IIa kongreso de la komunismaj organizoj de la orientaj popoloj, substrekis mi).

Apenaŭ du jaroj pasis inter tiuj du asertoj. Intertempe, la revoluciisma Rusio devis kapitulaci antaŭ Germanio (traktato de Brest-Litovsk, marto 1918), la germana revolucio estis subpremita (komence de 1919), poste, en aŭgusto 1919, tri monatojn antaŭ la ĉi-supra Lenina kontraŭ-imperiisma proklamo, la lasta espero malaperis okcidente kun la disfalo de la soveta respubliko de Hungario. Tiam oni povas kompreni, kial la juna Sovetunio komencas sin turni al Oriento. La triamondismo, tiu nova partikularismo propra al la proletaj nacioj, kiu spertos sian apogeon dum la 1960aj jaroj, tiel datumas de la 1920aj jaroj[10].

---

9 La 19an de januaro 1919, kvar tagojn post la murdigo de Luxemburg kaj Liebknecht, la soci-demokrata partio, kies ĉefroluloj (Ebert kaj Noske notinde, ambaŭ veraj laboristoj origine) kunkulpas pri la amasbuĉoj de la spartakistoj, ricevas 37,9% de la voĉdonoj okaze de la balotoj por la konstitucianta asembleo. Ĝi fariĝas, kun 11,5 milionoj da voĉdonantoj, la unua germana partio. Kiu asertis ke la perfido ne profitas? La Germanio de 1919 deziras nur finplenumi sian burĝan revolucion, certe ne komenci la proletan.

10 Iom post la ĉi-supra triamondisma aserto de Lenin, en julio 1920, dum la dua kongreso de la komunisma Internacio, hinda delegitulo, Roy, elsendas aŭdacan tezon laŭ kiu Azio estas la ŝlosilo de la tutmonda revolucio (franclingva citaĵo en Carrère d'Encausse & Schram, "La marksismo kaj Azio" [*Le marxisme et l'Asie*, 1853-

Laboristarismo aŭ naciismo? La rigardado al la du pasintaj jarcentoj evidentigas, ke la ĉefa fakto de nia modernepoko ne estis la laboristarismo, kiel iuj tion estis esperintaj (kun la socialismo konklude), sed partikularismo ja pli limigita, la *naciismo*. Ĝisnune, la nacia konscio notinde transpasis la klaskonscion karan al la ĉiatendencaj revoluciuloj. Antaŭ la klasbatalo, la ĉefa motoro de la modernepoka historio estis la nacibatalo. Malesperante pri tio, ĉu oni devas konkludi ke ĉia espero de emancipiĝo estas alĉiame forlasinda?

Tiel ni havus ja malbonan opinion pri la popolo, pri ties inventiveco, ties genio. Aliaj specoj de sociaj movadoj, universalismemaj, aperis intertempe, ni menciis iujn kiel la ekologiismon aŭ la feminismon. Ili foje iom sukcesis. Envere, ja de nelonge – apenaŭ kelkajn jardekojn - unu duono de l' homaro, tiu de la ina sekso, komencas vidi agnoskitaj siajn rajtojn.

La historio daŭras. La subpremuloj ne eldiris la lastan vorton. Ĝisnune la laboristarismo, laŭ la limigita koncepto de la termino, senrevigis multajn. Sendube. Tamen, la Modernepoko ne ĉesis naski proletaron ja pli ampleksan, kiun konsistigas ne nur laboristoj, sed ankoraŭ malriĉaj kamparanoj, senlaboruloj kaj aliaj forpelituloj. Tiu homamaso inventis novajn formojn de lukto, de organizado. Hodiaŭ ĝi naskis tiun ampleksan diverspecan movadon, kiu preferas sin nomi *alimondiismo* ol *kontraŭmondiismo*. Tie ĉi aŭ for luktoj okazas, novaj formoj de organizado estas esplorataj…

*

De la prahistoria tribo ĝis la modernepoka naci-ŝtato pasante tra ĉia formo de homa organizado, la multoblaj sociaj partikularaĵoj inventintaj de l' homaro neniam ĉesis interkomuniki. Tiujn rilatojn oni povas klasi laŭ tri grandaj tipoj: ***interŝanĝoj*** (komercaj aŭ ne, kiuj estas, *neŭtraj reciprokecoj*, pli malpli ekvilibraj), ***kunlaboradoj*** (*pozitivaj* reciprokecoj) aŭ male ***luktoj*** (*negativaj* reciprokecoj). En Okcidento, ekde la Renesanco, tiuj diferencaj rilatoj komencis intensiĝi inter diversaj politikaj formiĝoj (teritoriaj ŝtatoj, imperioj, civito-ŝtatoj k.a. Unuiĝintaj-Provincoj); la afero notinde implikiĝis. Finfine, dum nia Modernepoko, sociaj partikularaĵoj kaj partikularismoj, kiel fuĝintaj el la skatolo de Pandora, ekmultiĝas kaj interagas diversmaniere. Kunlaboradoj, interŝanĝoj, luktoj… ekabundas, eniras la socion tra ties tutaj poroj, ĝiskore en la familioj. Ili koncernas ne nur la konkretan kampon sed ankaŭ la idean. Per la liberalismo, la interŝanĝoj atingas neviditan skalon. Ankaŭ la luktoj, tiagrade ke iuj sorĉistlernantoj decidis inventi novan koncepton, tiun de la *civilizacia kolizio*, provante ĝin enpraktikigi.

Sekve de ĉio, kio antaŭas, ni povas konkludi per sentebla pliriĉigo de la fama frazo de la *komunisma Manifesto*. La historio de l' tuta ĝisnuna socio estas la historio de la nenombreblaj dialektikaj interagoj: pere de interŝanĝoj, kunlaboradoj aŭ luktoj – de la diversaj homaj partikularaĵoj kaj partikularismoj.

La emancipado de la subpremuloj estu la ellaboro de la subpremuloj mem.

Djémil KESSOUS
Oktobro 2006

1964]", Armand Colin 1970, p. 197 k.s.)